

Raportas Kubo 8 novajn kazojn de Covid-19 kaj neniun forpason



Havano, jul 6 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi dimanĉo, oni konfirmis 8 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2380 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 136 pacientoj. Aliaj 108 personoj estas kontrolataj tra la baza sanatento.

En tiu tago oni analizis 3375 samplojn, el kiuj 8 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 186 518 studitajn samplojn kaj 2380 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. Ĉiuj estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 88,4% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj dum totalo de 163 personoj estis kontaktitaj eksterlande. El la totalo konfirmita 54,2% estis sen simptomaj.

El la novaj kazoj 4 estas viroj por 50,7% el la totalo . El la 2380 pacientoj diagnozitaj, 58 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 86, kun indikilo de morteco je 3,61% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 21 rilate la mortec-indikilon en la regiono kaj en la pozicio 103 en la mondo. Restas la nombro de du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 2234 jam rekuperi?intaj (5 pliaj hiera?). Kvar pacientoj estas en grava stato.

?is sama dato la mondo akumulas pli ol 11 milionojn da konta?itoj pro tiu ?i malsano kun indikilo de morteco je 4,76 % dum la amerika regiono havas iom pli ol 51,0% el ?iuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 4 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 4,56%.

La tuta lando estas jam en rekuperi?a etapo. En 13 kubaj provincoj oni ne raportis kazojn dum la lastaj du semajnoj kaj pro tio la lando ekigis la rekuperi?an etapon.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo la a?toritatuloj insistas pri konservo de higienaj reguloj por eviti revigli?on de la nova kronviruso.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/227689-raportas-kubo-8-novajn-kazojn-de-covid-19-kaj-neniun-forpason>



Radio Habana Cuba